

MEZSEKI KÖNYVTÁR
MASÓTEREM
BALGÓTARJÁN

HUNGARA VIVO

9012 · 20, - Ft

El „Tra l' Silento”

Edmond Privat (1889-1962) estis elstara figuro de la heroa komenca periodo de la Esperanta movado kaj literaturo. Tiu ĉi lia poemaro — aperinta la unuan fojon en la jaro 1912 — definitive pruvis la taŭgecon de Esperanto por lirika poezio. Ĝi demonstris ankaŭ la senlimajn eblojn esprimi per la vortoj de la „artefarita lingvo” homajn sentojn en la plej subtila formo.

Kiel la subaj specimenoj montras, tiu ĉi poemaro ne estis direktita al iu malvasta elito de poeziamantoj, sed vere al ĉiuj esperantistoj. Ĉi tiu nova eldono de Tra l' silento (kun la postparolo de Ed Borsboom) estas la kvina en la vico; ĝi estas ero de la Serio Originala Literaturo Klasika de la Eldonejo PRO ESPERANTO, kaj sub n-ro 7 tiu de la Serio Esperantaj Klasikaĵoj de Hungara Esperanto-Asocio.

LASTA KISO

Vi kien flugas, papilio,
Tremante kaj rapide?
Jam mortis rozo kaj lilio
Kaj venas frost' perfide.

Flugiloj viaj kvazaŭ lampo
Briletas en nebulo.
Vi kion serĉas tra la kampo,
Perdita somerulo?

Dezertaj estas la ĝardenoj,
Tra kiu vagis amo via.
Skeletoj ŝajnas la verbenoj
Sub kverko senfolia.

Vi kial flugas en malvarmo
Tra flora la tembejo?
Sur ĉiu loko pluva larmo
Nun restas en herbejo.

Silentas ĉiuj en la nestoj
Kaj svenis bonodoroj.
Jam ne batalos vi kun vespoj
Pri la floretaj koroj.

Jen restas nur en kampo vasta
Velkinta krizantemo,
Sur kiu kiso via lasta
Mortigos vine en tremo.



KANTAS AMO

Pli bela ol ondo, pli forta ol vento,
Kantadas la amo plej dolĉan muzikon.
Ĝi kantas en koro, ĝi kantas al sento,
Ĝi kantas orgene ravadon mistikan.

Ĝi kantas tre longe, ĝi kantas lulante,
Kaj, unu post unu, la revoj de l' koro,
Jen kvazaŭ abeloj el oro brilanta,
Al kampoj de floroj ekflugas en gloro.

Sur blanka siringo jam svenas vespero,
Kaj amo kantadas, dum flugas abeloj,
Kaj ĉiam pli supre tra nokta l' aero
Ĝi lulas la revojn ĝis kampo de l' steloj.

Ĉe l' kampoj eternaj en alta ĉielo,
La orajflugiloj rondzumas laŭkante,
Kaj preĝoj infanaj sur voj' de malhelo
La revojn renkontas al Dio flugante.

Pli bela ol ondo, pli forta ol vento,
Kantadas la amo plej dolĉan muzikon.
Ĝi kantas en koro, ĝi kantas al sento,
Ĝi kantas orgene ravadon mistikan.

Iniciato bonvena, sed miselekta

RECENZOJ

Pintoj inter valoj

Hélène Blais: Scribe haletante, Éditions Onde, LaSalle, 1988. 73 p.

Hélène Blais: Skribistino anhelanta, Eldonejo Ondo, LaSalle, 1988. 73 p.

La sorto (redaktoro de Hungara Vivo) enmanigis al mi samtempe tri poemarojn por recenzo: krom la prilaktata, „Zigzago” de G. Gazizi kaj „La tago de l' eterno” far N. Lozgačev. Ĉi-lastaj malfacile legeblas pro l' antaŭdiluva mimeo-tekniko, dum Blais pro tio, ke...

Kvankam la suple eleganta, palpe ĝua volumeto, eĉ kun kvar tutpaĝaj ilustraĵoj de Arlette Blais-Kwiecien, imponas per ekstera profesieco, ne direblas tio sama pri l' enhavo. El afable kunmetita „Komunikaĵo” de la eldonejo ni sciigas, ke la aŭtorino „en junio 1988 lanĉis sian unuan literaturan solo-libron” ĉe la „Eldonejo Ondo, fondita de Claude Lebus (kiu) volas promocii (verŝajne konatigi, disvastigi — I. E.) kebekan kaj kanadan literaturojn, france kaj esperante, tra franclingva kaj esperanta legataroj”. Miaopinie nia traduka literaturo bezonas ĝuste tiajn iniciatojn, (potencialan) internaciigon de plej freŝe nuntempaj beletraĵoj! Kaj des pli bone, ke la eldonisto samas por ambaŭ, samaspektaj, eldonoj: la esperantiginto mem (kiu zorgis, ke ankaŭ la franclingva eldono menciu: „traduko disponebla en esperanto”). Sed ĉu la elekto estis ĝusta?

Por respondi fideinde, mi devus povi situigi la poemaron en la kadro de l' kebeko literaturo, kiun mi ne konas... „Virino esti / kaj verki / kvazaŭ / elĉerpante sin ĉe l' akvo / en tero Afrika”, libroeka memdifino, ankoraŭ impresas konvinke, sed verdire poeziaj trafaĵoj kaj trovaĵoj sporadas en la kolekto, kiel „Vortoj volas akuŝi / obstinaj oceanoj moviĝante dum alfluso” (p. 14.) Kun la akuŝistina helpo de Blais (p. 43.) vortoj ja akuŝas, sed ...nur vortojn. La poetino tro fidas unuopajn bildojn, kiuj ne kunkoheriĝas, kaj ŝi lasas sin gvidi de fonemludaj hazardoj ĉe la enpoemigo de vortoj, ĝis tiu grado, ke foje oni demandas sin, ĉu temas pri speco de aŭtomata verkado (*écriture automatique*) aŭ pri intenco ŝoki per la nekutima apudo de nur-aliteraciaj senkonektaĵoj („*effigies effeuillées*”, p. 24.) kaj vanaj homoteleŭtoj („*rotine des tartines en crinolines*”, p. 23.).

Ĉi-lastajn mi citis france, ĉar legante la „Skribistino”, mi volis konvinkiĝi, ĉu mia impresoj pri la „Scribe” same estos malfavora. Bedaŭrinde, mi devis konstati, ke la tradukinto plenumis nur prozan, rigide vortal-vortan esperantigon. Malaperis eĉ la sona intereseco, ĉi-supraj sintagmoj ekzemple fariĝis la ridinde sensukaj „senvestigataj portretoj” kaj „rutin’ de la ŝmirpanoj el krinolinoj”! „*Tous pas arrimés a bon port*”, (p. 11.) vortluda aludo al la esprimo „*arriver a bon port*” perdas sian karakteron en „ĉiuj paŝoj fellĉe stivataj”, kvazaŭ ŝerco, se klarigita... „*fornique nique / nickel / quel port*” (p. 67.), kiun pravigas nur ide-asocia kunso-

no, tradukiĝas per duosukcesa „fiamoras mor’ / nickel’ / kian haven’”. „*Sans ambages*” (p. 20.) (=senceremonie, aperte) mistradukiĝas al „senbare”. Enŝteliĝas etaj lingvaj eraroj kiel „sin koloras” (p. 23.) anstataŭ „koloriĝas”, kaj plej ĝene la citaĵo, kiu aperas sur la kovrilo: „*Aŭskultu kion malsupreniras... aŭskultu kion mirinde venas*” (transitiveco ŝoviĝis en malĝustan lokon).

Sed pro la finfine malpoezia efiko respondecas la trouzo de plumpaj kunmetaĵoj: „*virseksul’*” (p. 34.) por „male”, „*mirsurprizita*” (p. 35.) por „*ébahi*”, „*angoregaj loĝejaĉoj*” (p. 22.) por „*des taudis en détresse*”. Pardonu tiuj, kiuj ne komprenas la francan.

Por ili jen statistika klarigo, laŭ la metodo de Henri Vatré, pri la plumpa efiko de la lingvaĵo uzita de Lebus: la 66 vortoj sur la unua paĝo (p. 11.) kunmetiĝas el 151 elementoj (radikoj, afiksoj, finaĵoj); same 66 vortoj, hazarde elektitaj sur la paĝoj 43-44. el 181 elementoj; dum ekzemple William Auld en sama vortokvanto laboras per nur 119 elementoj (En barko sempilota, p. 717.), Lozgačev (La tago de l' eterno, p. 10.) utiligas 128, Nervi (La turoj de l' ĉefurbo, p. 61.) 135 elementojn.

Por bona fino mi citu la plej impresan, mallongan, pecon el la kolekto (p. 28.)

„Viens
à môme
mon bol de lait
saper la chaleur du matin
en commun réveil félin
des hommes
qui se rangent”

kiu aperas per jena traduko:

Venu
direkte al
mia laktobovlo
fopreni la matenan varmon
en komuna kateca vekigo
de viroj
kiuj saĝiĝas”

anstataŭ kiu ni proponus
Ĝisvenu m
mian
laktobovlon
sapei la matenan varmon
en kuna vekigo kata
de viroj
ekordemaj

Glosa homoteleŭto: samfin(a)j vorto mimeo-tekniko: mimeografa tekniko

István Ertl
(Hungario)

Bertram Potts: Kaverno apud la maro. Novelaro. Eldonis: TK, „Stafeto”, Antverpeno/La Laguna, 1985. 228 p. 22 cm. ISBN 90 6336 025 8. Prezo: 27.00 gld. (390 forintoj).

Apenaŭ Bertram Potts povus oferti al la legama publiko enhave kaj kvalite pli varian novelaron, ol estas ĉi tiu. En ĝi bunte kalejdoskopas scenejoj, temoj kaj ankaŭ la Muzo ŝanĝadas sian vizaĝon. La sola afero, kiu komunas al tioma vario, estas la forta, karaktera lingvaĵo.

La aŭtoro, leĝerpluma nov-zelanda ĵurnalisto estas volumhava poeto (Poezia bukedo por geknaboj de la mondo, 1978), debutis kiel lerta tradukisto (Infanoj de la malriĉuloj de John A. Lee, 1972) kaj ne malhavas „metiajn” antaŭaĵojn ankaŭ en la novelarto (Nokto da timo, 1971) kaj ĉe la ridetanta Muzo (Facila skeĉalbumo, 1984). Ĉi tiujn „meritojn” kaj spertojn abunde kaj fojfoje redunde li fontigas en sia novela dekunuopo „Kaverno apud la maro”.

La kolekton uverturas „La ŝtrumpo-reĝo”, trista epizodo el la dua mondmilito. La titolheroo, soldato disportanta ŝtrumpojn al tranĉeanoj devas patroli kontraŭ la kutimrajto en la nokta nenieslando. Lia abrupta, „nejusta” morto igas liajn kamaradojn lanĉi la demandon, kial li devis morti kaj rekonsciigas ilin, obtuzajn pro la ĉiutaga hororo de la milito pri la valoro kaj digno de la homo.

La alian pinton reprezentas la titola novelo, kiu klopodas malplekti la kompleksan ligaĵon inter du bravaj viroj, kiuj reciproke simpatias kaj estimas unu la alian, sed kiuj havas tre diverĝajn aspirojn kaj pro tio ŝajne nepacigeblajn konfliktojn. La foriĝema, solecama „kavernulo” savas la vivon de maristo, kiu pro dankemo kaj el-ena agemo helpeme detruas la emeritan kvieton de la kavernulo. Ĉu eblas kompromisa kunekzistado kaj toleremo laŭ komunaj valoroj? Ĉi tio memorigis min pri nia eterna disputo ĉirkaŭ la „sama ideo” kaj pri la Baghy’a sarkasmo: „Pionirojn mi kritikas, la gvidantojn dorne pikas kaj konspiras kun persisto: estas mi esperantisto.”

Amare kaj samtempe distre lanĉas Potts la demandon, kiomgrade homoj kapablas demeti slajn okulvitrojn kun antaŭjuĝaj lensoj, en la scienco-fikcia novelo „En orbito unu centimetron”. Oni ne kredas al Tom Folliage, ke li kapablas superforti la graviton nur pro tio, ke li estas — ĉi-vidpunkte hazarde — magilisto. Ĉu ankaŭ ĉi-foje parafrazo pri la sama temo? Se io (ekz. Esperanto) ne enrudoblas en pretan kliŝon, ĝi forĵetendas, ĉar pli facilas rubigi ol revalorigi. Konata afero, ĉu? Mi nur bedaŭras, ke la iom arbitraj solvoj de kelkaj situacioj mapiiigas la artan valoron de la novelo.

Inter pintoj troviĝas valoj. Ne nur la titoloobjekto de la novelo „La muziko de Marko” estas pala, sensuka, sed ankaŭ la novelo mem; griza, seninteresa pri homo griza kaj seninteresa. Burleskaĵo mi pensus

kaj multe mi priridus la seriajn misaventurojn de la unuataĝa, debutiera vilaĝa policano Leslie Blotter en la novelo „Lia bonŝanca tago”, se Potts ne volus kredigi min penforte pri ilia vereco. En ĉi tiu ĝenro „aŭtentikeco” rompas la sorĉon. Krome, tro multe da salo malbonigas la manĝon, aŭ kiel li diras, kelkfoje pli estas malpli: la gagoj tiom densas, ke mankas paŭzo por spiro. Kaj sen spiro ankaŭ ridi ne eblas.

Potts ekbriligas sian verskran talenton en „Kiam poeto amindumis”, kie apud filigrane ellaboritaj, memvaloraĵ ampoejoj nin amuzas ankaŭ perfektaj mekmekaĵoj, kiel: „La pluvo falis el la nuboj, pri tio ne ekzistas dubo; malseka ĉiu guto estis, ĉar miaj vestoj ĝin atestis!” Sed menciindas ankaŭ la ironia psikologia analizo de la protagonisto, primitive ruzeta labortedito vivanta sur alies koloj kaj ŝveliganta sin per fremdaj (ankaŭ aŭtoraj) plumoj.

Kiuj prenas la libron por ridi, abunde kompensiĝas legante „Guto da oleo” kaj „La statuo” (ĉi lasta pri Esperanto-klubo), skribitajn per plumo trempita en liberigan humuron. „La ŝrumpiĝinta kapo” — kia titolo! — kondukas nin al nokta aventuro en fremda mistera domo. „La vilaĝa spicisto” — jam serioza temo — biografias la diverĝon de modela entreprenemo kaj ŝlemilemo, instruon por ontaj soclandaj novkapitalistoj.

El la bunta arta kvalito de la noveloj akre elstariĝas ilia lingvaĵo, daŭriganta la tradiciojn de Schwarz kaj Baghy. Potts uzas nur PIV, nur mal-vortojn, nur akademiaĵojn, sed en tiel esprimiva, sprita kaj ideoriĉa kombino, ke oni inklinas kredi Espranton Palasa Atena elsaltinta en kompleta armaĵo el la Zeŭsa frunto. Potts uzas abunde — male al la plimulto de originalistoj — frazeologiaĵojn, proverbojn, tropojn, fiksjajn komparojn, metaforojn kaj parolturnojn. Plue, li esprimas sin sprite, trafe kaj harprecize. Jen kelkaj Pottsajoj el la superriĉo: „aŭskulti gaporele”, „sentaŭga neniofaranto kun maratona elokvento”, „abisma manko de kompreno”, „uzi la nazon bufre”, „li puŝis sin sovaĝe tra la densejo, kiel ŝpruco el sifono”; „puŝis la infanĉaron kiel sieĝan ramiĉon sinjorino kun makzelo kaj korpo de amazono, buldozante sian vojon tra la densa trotuaro”.

Mi rimarkis nur malmultajn makuletojn sur la brile blanka tolo: „veni” ne identas kun „iri”, „komforti” ne signifas „anime fortigi”; „da” kelkfoje anstataŭ „de”; „timofrapa” kaj similaj vortkunmetoj ŝajnas ne de-Saussure’aj; „Bakuso” devus esti „Bakho” aŭ „Bakko”.

Aparte simpatie estas al mi, ke li evitis la eternan kaptilon de Esperante verkantoj; la steriligan malkonkretecon, „Esperantigon” de lokoj, cirkonstancoj kaj nomoj, kio evidente, kondukas al absoluta malaŭtentikeco.

Potts estas bonega „metiisto” — plus iom pli.

József Kiss Horváth

Malgraŭ makuloj rekomendinda

*Helena kaj Jozefo Mikulás: ESPE-
RANTO — POR NI (1 = 4), entute
264 paĝoj, Hungara Esperanto-Aso-
cio, prezo: 9,90 gld. po kajero, entute
39,40 gld. (Por Hungario: 45,- forin-
toj)*

Jen plia „internacia” lernolibro sur la Esperanto-merkato. Sub „internacia lernolibro” oni kutimas kompreni, ke la libro enhavas nur Esperantlingvajn tekstojn. Tio igas ĝin utiligebla tutmonde por klasa aŭ grupa Esperanto-instruado. Por aŭtodidakta lernado de la lingvo ĝi malpli taŭgas, ĝuste pro la manko de gepatra-lingvaj klarigoj rilate vortojn kaj gramatikaĵojn.

La verko ampleksas 4 kajerojn 64-paĝajn, kaj la verkintoj estas la (instruista) geedza paro Mikulaŝo: Jam komence mi ŝatus tuj esprimi, ke la 4 kajeroj estas verkitaĵoj kun granda amo. La celgrupo por la Mikulaŝa kurso estas la 8- ĝis 13-jaraj infanoj. Ĝuste al tiu aĝogrupo interesas la riĉenhavaj historietoj, la multaj ŝercoj kaj anekdotoj, la fabloj kaj aparte la multaj enigmoj kaj frazo-ekzercoj.

Tute ĝenerale oni ja rajtas diri, ke nur spertaj instruistoj uzu internacian lernolibron. Sed tiu eldiro validas aparte forte por la Mikulaŝa verko. Kial? Nu, ŝajnas al mi, ke la tuta kurso ne estas sufiĉe elprovita en la praktiko. Krome la lingvaĵo ne ĉiuloke estas modela, tiel ke mi supozas, ke mankis ankaŭ la reviziado de la teksto flanke de eksterlanda (ne-Hungara) spertulo. Jen nur kelkaj negativaj punktoj:

La unua „regulo” (p. 6.) estas tiu, ke viraj individuaj nomoj finiĝas per -o, virinaj per -a (Paŭlo, Paŭla ekz-e). Starigi tion kiel regulon, estas nete kontraŭ-Fundamente. Ĉar laŭ la Fundamento la sufikso por la virineco estas -ino. Aplikante la Mikulaŝan „regulon” oni ekzemple ne plu povas klare kompreni, kio estas „Paŭla letero” (Ĉu de Paŭlo, ĉu de Paŭla?). Cetere, sur p. 170 subite aperas „Helenjo”, do (kaj ĝuste!) virina nomo kun -o.

Tre malfeliĉe oni enkondukas la akuzativon per la frazo: „Petro demandas Marian.” Estas ja precipe la substantivoj, kiuj povas aperi en akuzativa formo, do kun -on en la fino, ne kun -an.

Ordonojn al la infanoj oni esprimu imperatively. Anstataŭ „nun vi legas” oni prefere diru: Nun vi legu! Simile: Nun vi desegnu, ni ripetu.

En multaj lokoj la verkintoj ne atentis, ke subordiga frazo estas rigardenda kiel akuzativa objekto, ĉar oni povas anstataŭigi

ĝin per la vorto „tion”. „Li salutas al la patro kaj demandas lin: Ĉu vi scias, kie estas la hotelo?” Transformita: Li salutas al la patro kaj demandas lin tion (2 akuzativoj!). Ĝuste: Li salutas la patron kaj demandas al li... Simile (p. 64): Kion vi faras, Maria? demandas li ŝin. Ĝuste: ...li demandas al ŝi. Tre malbele sonas (p. 117):... demandas Maria Julian. Prefere kaj ĝuste: ...demandas Marino al Julino.

La sufikso -io por landnomoj estas kontraŭ-Fundamenta. La sufikso por landnomoj estas -ujo. La apudmetado de la 4 nomoj (p. 86) „Bulgario, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Sovetunio” kun la finaĵo -io tuj supozigas, ke en Sovetunio loĝas la Sovetunio. Grava tiudirekta eraro troviĝas sur p. 235: „Thebo estis urbo en la malnova Egipto.” Ĝuste: Tebo estis urbo en la malnova Egiptujo.

Jes, entute la propraj nomoj! Ĉu oni ne rajtas postuli, ke en internacia lernolibro la nomoj de la (fiktivaj) personoj aperu senescepte en Esperantigita formo? Kiu instruisto povas instrui la ĝustan kaj senriproĉan prononcon de „Salla, Eiffel, Danko, Francis, Yannick” (p. 117)? La nomoj apartenas al diversaj fonologiaj sistemoj, kiuj ĝenas sin reciproke.


Fuŝa estas ankaŭ la radikoduoblo en „plenplena, finfine, fojfoje”. Analizante tiujn vortojn, vi trovas „plena de la pleno, en la fino de la fino, en la fojo de la fojo”. Prefere kaj ĝuste: plenega, fine, kelkfoje. (p. 171)

Ĉe lernolibroj oni esta kutimiĝinta al tio, ke la tuta enhavo estas ordigita laŭ ĉapitroj kun lecionaj numeroj. Tiaj numeroj bedaŭrinde mankas ĉe Mikulaŝo.

En la fino de recenzo la leganto serĉas la indikon pri la a[^] cetindeco de la libro, kvazaŭ la juĝnoton. Nu, malgraŭ la manko mi rekomendas la libron. La menciitajn erarojn la sperta instruisto povas relative facile korekti kaj forigi. Kaj des pli la klasoj ĝuos la perlojn de la libro: la ĉarme ilustritajn historiojn, la enigmojn, la ofte tre lerte verkitaĵojn ekzercojn kaj nelaste la kantojn.

Hermano BERMANO
Paderborno (FRG)





Fiera edzino

— Perfekte lavu vian ĉemizon! — avertas severe Paŭla sian edzon — neniu diru poste mallaŭde, ke mi ne scipovas lavi!

Hipokrita edzino

— Mia edzino estas nekredible hipokrita.

— Strange! Tamen kiel kompreni tion?

— Nu, kiam mi kokras ŝin, ĉiam ŝi ŝajnigas kvazaŭ ŝi kredus miajn vortojn!

Tro okupita

— Panjo! Kion signifas „erotiko“?

— Kiel mi povus tion scii, filinjo! Kiam iu havas tiom da infanoj kiel mi, tiam tute mankas la tempo por lerni fremdvortojn!

Nepre dunginda

Nova infanvartulino prezentas sin.

— Kial vi forlasis vian lastan laborlokon, fraŭlino? — demandas la mastrino.

— La mastrino tie opiniis, ke mi ne sufiĉe bone lavis la infanojn.

— Akceptu ŝin — kriegas la infanoj ĥore — panjo, akceptu ŝin!

Nepre sciinda!

S-ano Stelano hejmenvenis, sed... nu, kiel diri alimaniere... iom tro-tro frue. Edzinjo kaj s-ano Verdul paralele videblas en la lito.

— Ho! Mi sciis! — ekkrias Stelano kolerege.

— Ĉu vere? — indignis la surprizita edzinjo. — Mi apenaŭ memoras tion. Sed Verdul eĉ nun scias!

Malagrabra edzo

— Laŭ la kartoj, mi antaŭvidas — diras aŭguristino — ke vi baldaŭ konatiĝos kun riĉa, altranga junulo.

— Kaj ĉu ni kontaktiĝos intime? — scivolemas avide la sinjorino.

— Li volas vin edzinigi... sed intervenas ia malbonulo farante obstaklojn...

— Ho, certe mia edzo! Li estas kapabla eĉ al tio...

GAJA PAĈO



Timiga venonto

— Teruran venonton mi vidas en viaj manlinioj — murmuris alia maljuna divenistino. — Oni murdos vin, poste — dio mia! — via korpo estos fritita, eĉ... oni manĝos vin!

— Haltu, momenton! — interrompas la klientino — lasu min demeti la porkoledan ganton...

Feliĉa pasinto

— Antaŭ jardekoj mi kaj mia edzino vivis vere feliĉe — rakontas gasto en drinkejo.

— Nu, kaj kio okazis poste? — demandas alia gasto.

— Dum iu bela printempa tago ni interkonatiĝis...

Feliĉa infano

— Diru edzinjo, ĉu al nia filineto vi ebligis legi la „Bildlibron de la seksa vivo“, kiun mi aĉetis en librejo de HEA?

— Imagu, ke ŝi ĵus riproĉis la mankojn de tiu manlibro.

Eble ŝi

diris antaŭ la katedro:

— Sinjoro instruisto, ĉu vi vere volas koni, kion mi faris hieraŭ anstataŭ skribi la hejman taskon?

Certe ne ŝi

ricevis la patrinan malpermeson:

— Neniel vizitu hejme Paŭlon! Tie povas okazi foje malagrabraĵo, ia ĝeno al vi, filineto!

— Sed kial, panjo? Okazos nenia ĝeno, ja Paŭlo ĉiam zorge fermas la pordon!

Pasis cent jaroj

post la naskiĝo de sinjorino Matilda. La jubileanton intervjuis juna ĵurnalisto kun la demando:

— Se vi denove komencus vian vivon, avinjo, ĉu vi vivus sammaniere?

— Jes, tute sammaniere! Tamen, tamen... mi komencus la stultaĵojn multe pli frue, do estos tempo por fari multe pli...

Du proverboj

Du internacie konatajn proverbojn ni citas el la Zamenhofa Proverbaro en la linioj H.1. kaj V.1. (ensendendaj linioj). Inter la solvantoj ni lotumos premiojn.

Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Horizontale: 13. Ŝanĝi pozicion de io(R), 14. Duobla organo, elfiltranta la urinon el la sango, 15. Ebenigi lignon(R), 16. Sufikso, reen: persona pronomo, 17. Stato de totala ebrieco(R), 18. ...animo: tre, eĉ tro sentema hono, 19. Nekovrita ujo por lavado, 21. Honore respektas al iu, 23. Reen: homa korpopart', 24. Malbona antaŭsigno, 26. Sufikso por femaloj, 27. Kiel H.40. 28. Konfuzitaj pro drinkado, 30. Verba finaĵo, 31. Reen: havis ideon pri io, 32. Refleksiva poseda pronomo, 33. Leda strio por vestaĵoj, 35. Aktuala situacio(R), 36. Fino de boto(!), 37. Parto de la brako, 38. Returnire, 39. Komenco de rondo(!), 40. Nenormala malgrandegulo, 41. Blasfemi(R), 42. Ronda disk', 43. Agadtereno, medio, 45. Persona pronomo, 46. Koncerna kunvenon de episkopoj, 48. Soldata ĉapo, 49. Prefikso, 51. Gvidanto de la rusa revolucio, 52. Ekstrema flanko, 53. Faros ion punendan, 56. Malrapide prezentata muzikaĵo(R), 57. Elmetos ion al danĝero, 59. Vertikale grandaj, 61. Populara trinkaĵ', 62. Teatrisko(R), 63. Kantbird', 64. Kondukt',.

Vertikale: 2. Mez-Amerika lando, 3. Identaj konsonantoj, 4. En alta grado, 5. Rulgvidilo de vagonaroj, 6. Spirito, 7. Virina nomo, (drama heroino de Ibsen), 8. KJ, 9. Sin movis, 10. Kripla je piedoj(R), 11. Kiu antaŭpagas por regule ricevi ion(R), 12. Kalia salo, koloriga ruĝa substanco, 17. Havigi ion al iu, 18. Kiel H. 37. (R), 20. Konforma al realo, 22. Prepozicio, 25. Loĝanto en agrabla parto de la dezerto, 27. Ne la vian, 29. Elektre ŝargita formo de atomo, 30. Tabelvorto, 31. Senfrukta, nekapabla naski(R), 34. Ne — angle, 35. Vira aŭ ina(R), 37. Pli granda ol lago, 38. Radiumo, 39. Varmiga aparat', 40. ..., sed antaŭe (du vortoj), 41. Refleksiva pronomo, 42. Cirklo(R), 44. Vira nom', i.a. de FEZ, 45. Intenco(R), 47. Negaciaj, 49. Amasveturilo(R), 50. Marfunde vivanta best', 53. Nigra bird', 54. Duopo, 55. Tablo — en pluraj slavaj lingvoj, 58. Sistem' de cifroj, 60. Ne la sama(R), 63. Reen: H.39., 64. Aŭto-simbolo de Nord-Afrika ŝtato.


I.Z.

Solvo de la krucenigmo en la n-ro 1989/5:

„Ne uzu epitetojn superfluaĵn, banalajn, ŝtopajn, plumpajn kaj enuajn.”

(La Arto Poetika, de C.E.R. Bumy)

Premion gajnis: s-ino Elda Corrado, Milano, I; s-ino Esperantina Mirska, Budapeŝto, H; s-ro Ferdinand Simon, Bruselo, B



➡ EKZAMENO SEN RISKO ◀

Ekzamenanto: Márton Fejes

**Arto kaj naturo
de Reto Rossetti**

Pri lingvo kaj literaturo eseojn, eĉ etan antologion enhavas tiu libro de la konata aŭtoro.

1. En kiu studo estas menciita Arkimedo?
2. En kiu traduko uzis Zamenhof unuan fojon la vortojn: *indo* kaj *eblo*?
3. En kiom da kategorioj estas aranĝitaj la originalaj kaj tradukitaj poemoj en la eseo: „Poemoj el du poŝoj”?

Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1989/5:

1. Kvin poemoj de Zamenhof troviĝas en la *Esperanta Antologio*, redaktita de William Auld, 1984.
2. Eŭgen Miĥalski verkis: „Ciklo de l'arĝenta astro.”
3. Aŭtoro de la poemo „Al abortita ido” estas Bojidar Vanĉik.

Premion gajnis: s-ro Rudolf Bajelik, Trenĉin, CS; s-ino Pataki Lajosné, Budapeŝto, H.

La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Korespondi deziras

— Irina Zaborskaja (20) ktm, pri muziko, literaturo, turismo, *Gomel*, str. Borisa-Carikova 57-13. SU-246.025. — S-ro Jaroslav *Ostapuk* (19) pri tajĝiĉjuan, aikido, ĉi-gongo k.s., krudmanĝado. *Moskva* ul. Artjuĥinoj 21A-25. SU-109.263. — F-ino Aŭŝra *Kavaliaŭskaite* (19) ktm. Gruziai, Kolhozo, reg. Vienybe, Litovio SU. — *E-Klubo* Alfabeto (9-60) ges-anoj, ktm. pĉt. *Marijampolé*, Angariecio 88-9. Litovio SU-234.520. — *E-Klubo KALUGA*, per bk pri pejzaĝoj, naciaj dancoj k.a. Ul. Lenina 103, SU-248.600. —

Pri *Antoni Grabowski* korespondus el lia urbo pro centrjariĝo de tiea E-movado: f-ino Galina *Kuĥnecova* (23) ktm, *Ivanovo*, pr. Lenina 98, kv. 51. SU-153.004. — Poŝtistino Ene *Rebane* (20) ktm, *Haapsalu*, Mulla 6-60, Estonio SU-203.170. — s-ro Jerzy *Kowalski* (29) laboristo, pri muziko, flolkloro, filmo, turismo, kol. bk, tur. prosp. *Glogów* str. Obr. Pokoju 16E/10, PL-67-200. — F-ino Pavlina *Penkova* (27) ktm, pĉt. *Sennik*, str. P. Deŝkov 1, BG-5450. — Junaj bibliotekistinoj el *Bielawa*, PL-58-260, ktm: Alicja *Strózik* (ul. E. Thelmann 40m6) kaj Helena *Tews* (Os. Wlókniarzy 5m18), ankaŭ Marius *Tewsk* mezlernejano kol. E-ajojn. b.k. ktm.

— F-ino Graĵina *Uĵkurnyté* (22) kun geamikoj. *Vilnius* ul. Engelsa 65-23, Litovio SU-232000. — Miroslaw *Mazur* (29) laboristo, pri historio, literaturo, artoj, fotado. *Swidnik* str. Przodow. Pracy 121, PL-21-040. — Adam *Choroszewski* (14) pri komputilo, muziko, fantastiko. *Tychy*, *Zgrzebnioka* 56/6, PL-43-1000. — Instruistino Dora *Getova* (40) pri artoj, turismo. *Plovdiv* str. Brezovska 16, BG-4003. —

E-klubo (14-17) novefondita, interkonatiĝi kun E-klubo kaj s-anoj ktm. *Ĉernigov*, str. Oktobra Revolucio, E-Klubo DESNO, Palaco de Pioniroj. SU-250.000. —

LETERKESTO

— S-ro Adamo *Goralski*, Santa Gruz, Kanarioj: Via diligenta serio de Sonkasedoj por blindaj samsortanoj, aparte la laste ricevita n-ro 32, igis nin denove alte taksii — ne nur respekti — ĝian plurfacetan, vere buntan enhavon. Estas bone rimarkeble, ke la tona nivelo sekve de la akumuligintaj spertoj altiĝis, kaj la elektitaj muzikeroj — de Chopin — surprize lerte kondukas la aŭskultantojn de unu al alia programero. Apud raportoj pri E-aj okazintaĵoj, plaĉis al ni ankaŭ rakonto, fakte novelo, ties tre klare prononcita prezento. Estas ekster ajna dubo, ke viaj Sonkasedoj plenumas internacie bonfaran edukadon per kaj por Eo, ne laste por la tiom grava ekologia interkompreno. Pluajn sukcesojn!

— S-ro Eŭgeno *Perevertajlo*, Taŝkento, Uzbekistano SU: Eble ni devus ne nur konsenti, sed ankaŭ „kunplendi”, ĉar la perturbitaj valutoj cirkonstancoj eĉ pli malfaciligas nuntempe ĉian interŝanĝadon de Esperantaj eldonaĵoj. Inter ili la E-revuoj suferas verŝajne plej grave, ĉar abonado en landoj kun neŝanĝeblaj valutoj katastrofe trafis, se tiel diri, sakstraton, almenaŭ provizore. Kapojn preskaŭ rompante por trovi elirvojon, ni devas konfesi pri senkonsila situacio tiurilate. Alivorte: taŭĝan respondon aŭ konsilon ni ne kapablas doni al vi.

— S-ro Teodoro *Lówenkopf*, Maagan, Israelo: Tre kontente ni sciiĝis ke nia revuo estas komplete ĝuata de via, kiel ĉiama fadeno, interliganta vin kun la intermilita klubo Esperanta Rondo Amika (ERA), fondita kaj gvidita de *Julio Baghy* en Budapeŝto. Kiel perkorrespondanta instruisto de nia lingvo Eo nun vi troviĝas en cirkonstancoj ne favoraj al Eo — eble historie komprenebla aktuala situacio. Des pli estas agrable ekscii, ke en iama hejmo de la multmerita E-isto, *Isaj Dratwer* estas establita E-centro, fare de la entuziasma *Josefo Murĵan*. Espereble ni aŭdos foje novaĵojn ankaŭ pri la dezirinda agado de tiu nova E-centro. Korajn salutojn!

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO • Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik • Teknika redaktoro: Rózsa Vad • Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Stefan MacGill, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, d-ro György Nanovszky, Péter András Rados, Sándor Révész, Zsuzsa Varga-Haszonits. • Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk • H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 156-0244. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. • Respondeca eldonanto: Oszkár Princz. • Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtofiĉejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (HELIR, Budapest XIII. Lehel u. 10/a. H-1900) senpere aŭ per poŝtmandato. • Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto.

Indexszám 25 377 0018-7704, ISSN 0018-7704.

Készült a MESZ Nyomdában





Demonstrejo de bançambroj VIDIA

Freged, Kossuth L. u. 9-13.

Tel.: 24240






KORAN BONVENON EN DEPARTEMENTO K O M Á R O M

Agrablaj plezuroj atendas la vizitantojn en la pitoreskaj urboj ESZTERGOM, TATA kaj KOMÁROM.


La kuracakvan termobanejon de Komárom indas ĝui dum la tuta jaro.

Apud la termobanejo situas la dustela nova HOTEL THERMÁL de KOMTURIST — taŭga gastejo por ripozantoj.

H-2900, Komárom
Táncsics Mihály u. 38.
Telefon: 446 Telex: 27-434.



Estu nia gasto en Tata, Komárom, Esztergom.



1990-09-17

Informojn volonte donas al Vi:
Centro KOMTURIST
H-2890, TATA, II., Ady E. u. 24.
Telefono: 34/83-211 Telekso: 27-459

komturist
H-2890 TATA II., ADY E. U. 24.
Telefono: 34/83-211 * Telex: 27-459

